**Praha-ek-1955-25_26-01**

No 25 - 26 M a j o - J u n i o 1955 Aperas laŭbezone.

# D e s e t l e t Č S R

Deset let již uplynulo od chvíle, co příval jásotu, radosti a díků vítal v pražských ulicích vítězné hrdiny Rudé armády. Deset let! Malá kapka v nedozírném oceánu věčnosti. A přece v tisíciletých dějinách našeho národa není druhého desítiletí, které by se tak nesmazatelně zapsalo do života národa. Po čem národ celé věky toužil, co připravoval, oč celé věky usiloval a bojoval, toho dosáhl v slavném desítiletí 1945 – 1955.

V něm se sešli svobodní synové a dcery národa k společné práci ve svých továrnách a na svých polích, aby prostřeli sobě a svým potomkům bohatý stůl hmotného i kulturního blahobytu. Vyrostly nové závody, stroje, přehrady, elektrárny, školy, vyrostly nové lesy, šiŕé lány, sady, sídliště, stadiony, vyrostli noví lidé. Bídu zahnali od svých prahů, štěstí z práce rozseli kolem sebe. Láskou zasypali své děti, ženy i starce. Velkým i malým otevřeli umělecké síně, divadla, hrady i zámky. Největší ctí a odměnou zahrnuli kdysi vykořisťovaného horníka, dělníka, rolníka i jejich neohroženého ochránce. Deset let a jaký převrat v životě národa!

Proto v těchto dnech s takovou radostí a hrdostí pohlížejí pracující Československa na plody své práce, proto s takovou vděčností vzpomínají pomoci a nesmírných obětí sovětských bratří, proto se s takovým nadšením z jejich hrdel a srdcí nese do druhého desítiletí společné práce a do všech světových stran mohutný hlas:

„B u d u j v l a s t, p o s í l í š m í r !“

\- - - - -
\- -
\-

**Praha-ek-1955-25_26-02**



ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenadas ĉiumerkrede en Praha II – Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Depost la 19a horo samloke kurso por progresintoj, gvidata de Ant. Slanina.

Venontaj programoj:

11.5. Jaroslav Šustr: Dek jaroj de nia respubliko /komentario/.
Vuk Echtner: Plej junaj-esperantistoj.
18.5. Jan Zemek: Rakonto pri Hindujo kaj gazetartikoloj de Dro L. Hájek.
25.5. Oto Ginz: Kion mi travois kun Michail Šolochov /al lia 50a naskiĝtago/.

SOMERA FILMA POPOLA UNIVERSITATO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA.

Nia klubo dum junio aranĝas en la klubej opor siaj membroj kaj iliaj gastoj filmedukajn kalejdoskopon. Esperantajn komentariojn al ĉiu filmo preparis Josef Vítek en la kunlaboro kun Osvětová Beseda ONV 2 kaj popoleduka filmagentejo de KNV en Praha.

1.6. Perlo de Kaŭkazo.
Banejloko Jalta.
Kaspiga pordego /du partoj/.
8.6. Nova Pekino.
Nova Ŝanhajo.
Sudo de Ĉinujo.
15.6. Nia kulturado de fruktarboj.
Nevideblaj malamikoj.
Nevideblaj helpantoj.
23.6. El la vivo de ĉelo.
Senfina universo.
Geologia funkcio de vento.
Tertremo.
Polusa brilego.
29.6. Verko de profesoro Hrozny.
Kiel estas verkata landkarto.
Restsignoj de intaj Slavoj.
En dezertoj de malnova Chorezmus.

-----

JUNULARO de nia klubo daŭre kunvenadas ĉiumarde je la 19a horo en Praha III., Maltézské náměstí 14 – Deylův ústav.
Gesamideanoj preparas sin por la ekzamenoj, kiuj okazos duan mardon de majo. Oni ekzamenos gramatikon, literaturan, historion kaj taksos laŭ kutima junulara tabelo A, B, C.
Multaj el ni partoprenos la tutŝtatan konferencon en Otrokovice kaj Junularan tendaron en Vranov.
Venu inter nin kaj aktive partoprenu nian laboron! Van.

-----

Estro de Osvětová beseda, ONV Praha 2 kamarado Pavel K u d e l a mortis post operacio la 2an de majo en aĝo de 30 jaroj. La parencoj akceptu la esprimoj de nia kunsento!

-

ANTONIO kvindekjara! Kvankam la vizaĝo tion ne montras, tamen temas pri fakto. Nia kluba vic-estro ktp. ktp. la 3an de junio jubileas. Tiu ĉi solena tago kaj speciale la longa vico de gratulant/in/oj estos filmata /plej verŝajne/!
Ankaŭ ni esprimas niajn vere sincerajn bondezirojn al tiu ĉi simpatiulo!

**Praha-ek-1955-25_26-03**



A r t v e s p e r o h o n o r e a l n i a M a j s t r o.

La anonco de kluba Bulteno pri Zamenhofa vespero allogis mian atenton kaj mi decidiĝis partopreni ĝin en Praha la 13an de aprilo.
La programon per modeste decaj vortoj enkondukis prezidanto s. Šustr. Ankaŭ la sekvintaj vortoj pri nia Majstro de s. Vítek konvenis.
La ĉefan programon prizorgis anoj de la Verda ĉaro de Julio Baghy, kiujn mi vidas tiaj la unuan fojon. Mi konfesas, ke mi estis ege kaj agrable surprizita, ĉiuj estis eminentaj. Numeroj de Marta Ledková en pianakompano de Eli Urbanová montris unuarangan programon kantistan, ravee bele ŝvebis akordoj de Prav. Sádlo el lia violonĉelo kaj donis al la programo specialan koloron. Sed plej kaptis min dramscenoj de Eva Suchardová, enkondukataj per A. Seemann. Mi pardonpetas ĉe la ceteraj, ĉar min plej influas parolata vorto. Mi estas certa, ke muzikfakulo detale kaj alte taksus tiujn programerojn, ĉar ankaŭ min ili tenis je koro, sed la parolarton de E. Suchardová mi perceptis por ĉiuj miaj sensnervoj. Mi konis ĝin jam de pli frue, sed surprizis min ĝia kresko al perfekto. Kvankam ŝiaj maskoj estis nur duonformitaj, tamen estis eble senti plenan impreson el profunde kreitaj estaĵoj, precipe el drampartoj de Goethe.
La admirenda artokapablo de la Verda ĉaro meritas grandan Laudon kaj pli oftan scenaperon kaj ĝi konvene apostrofis meritojn de nia Majstro pri homalproksimiĝo kaj pacdefendo okaze de Lia mortotago. Mi ne bedaŭris, ke mi pro ĝi riskis tutnoktan dormon, sed iom doloris la nesufiĉa partopreno de samideanoj el Praha. Tamen memoro de Zamenhof kaj liaj homaranaj ideoj kaj peno devus ĉe tia okazo altiri pli grandan partoprenon. Kial Vi, karaj, lasis tiom da lokoj liberaj?

JK.

**Praha-ek-1955-25_26-04**



ĈU VI JAM…?

… aliĝis al la tutŝtata konferenco de Pacdefendantoj en Otrokovice? Se ne, petu aliĝilon de s-ino Fan Matušová en Otrokovice kaj aliĝu!

… abonis belan „Nian spegulon“. Se ne, abonu ĝin tuj sendante 10 Kčs al s-ano Ján Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín.

75 JAROJ DE ESPERANTA EPISKOPO.

Amata de la popolo, ŝatata kaj respektata de ĉiu, kiu lin konas, Th. Dr. Antonín Eltschkner, episkopo de Praha, ĝisvivos la 4an de junio 1955 75 jarojn de sia meritplena vivo. Episkopo Eltschkner estas la plej alta deĵoranta eklezia altrangulo en Ĉeĥoslovakio. Antaŭ ne longe li fariĝis preposto de metropolita, kapitulo ĉe sta Vito en Praha, krome li estas titola episkopo de Zefirio. Ni, esperantistoj, havas al la jubilanto Platon speciale varman. Estis la kurso de Esperantista Klubo en Praha, en kiu antaŭ la 31 jaroj Dro Ant. Eltschkner ellernis esperanton. Sed li ne nur ellernis la lingvon. Li praktikas kaj majstras ĝin vere eminente. En la daŭro de pasintaj 30 jaroj mi plurfoje havis okazon konvinkiĝi pri tio. En lasta vico post niaj bondeziroj, kiujn ni direktis al li antaŭ du monatoj okaze de 50a datreveno de lia sacerdotiĝo, kiujn li respondis en esperanto kortuŝe bela. Al s-ano episkopo okaze de lia vivjubileo ni sendas niajn plej sincerajn bondezirojn kaj korajn salutojn.

Esperantista klubo en Praha

---

La 4-an de januaro 1955 mortis en Praha la akademia skulptisto EMANUEL KODET /naskiĝis 23.3.1880/, la kvinto de artisme farita busto de Dro L. L. Zamenhof.
La belega grandformata busto estas verŝajne la plej vivece skulptita portreto de nia Majstro en la mondo. Ĝi estis farita de Em. Kodet por XIIIa Univ.kongreso de Esperanto en Praha en la jaro 1921 laŭ ordono de la kongresa komnato, kies sekretario estis Dro Aug. Pitlík.
Majstro Kodet skulptis la buston laŭ originalaj fotografaĵoj de Dro Zamenhof kaj laŭ indikoj de samideanoj, kiuj lin bone konis persone. Tial la busto estas vera majstroverko. Ĝi apartenas nun al la Esp.klubo en Praha. Dum la dua milito la busto devis esti bone kaŝita en sekreta loko kaj gardata, ĉar la nacistoj, okupintaj nian respublikon, certe neniigus ĝin pro la konataj motivoj.

FABA

---

REGIONA KUNVENO de la regionoj Ostrava kaj Olomouc okazis 27.3. en Bohumín kun ĉeesto de 59 delegitoj kaj gastoj el 17 lokoj, ankaŭ el Slovakio. La klubon en Praha reprezentis Mařík, Novotný, Novobilský kaj Kratochvílová. Post kultura programem de la Ostrava-Junularo, k. Janouš prezentis ĉeĥan prelegon „La signifo de Esperanto en la tutmonda, porpaca movado.“ Post raportoj de kunvenestro Slaný kaj de D-ro Mohapl pri lastaj reg.kunvenoj, Mohapl substrekis la funkcion de la Konsulta Komitato kaj ĝian devon registri ĉiujn esp.rondetojn en la lando kaj aperigi ilian liston kaj kunven-tagojn en la organo de KK „Nia Spegulo.“ La KK devas ankaŭ kunordigi la aranĝadon de reg.kunvenoj. Mohapl alvokis profiti pli grandskale de la ebleco fondi esp.rondetojn ĉe sindikatanaj kluboj. Decidite, ke venonta reg.kunveno okazu dum majo en Bystřice p.Host. Lamačka informis pri bezono de raportoj por „Nia spegulo“, kiu povas havi ok paĝojn. Kočvara informis pri IVa Somera Esp.Tendaro, nunjare apud la Vranov-valbaraĵo, en julio kaj aŭgusto; instruos i.a.prof. Kilián. Delegite de Praha raportis pri la sistemo de distribuado de Heroldo de E. kaj pri aliaj aferoj. Post la kunveno la ĉeestantoj vizitis komune la Esperanto-monumenton en la urba parko.

J.M.(X.)?

---

**Praha-ek-1955-25_26-05**



SINJORO TADEO de Adam Mickiewicz, FARAONO de Boleslav Prus – famaj perloj de pola literaturo estas reeldonotaj. Ni tre rekomendas al la atento de niaj legantoj enhavon de ĉi suba artikolo: Plenumkomitato de la Jubilea Mickewicz-jaro en 1955j. laŭ propono de Asocio de Esperantistoj en Pollando, decidis reeldoni la faman ĉefverkon de la pola literaturo „Sinjoro-Tadeo“ en la bonega traduko de Antoni Grabowski. La komnato decidis eldoni ankaŭ en esperanto ĉ. 100paĝan verkon de nuntempa pola verkisto kaj poeto Mieczyslav Jastrun pri Mickewicz. La decido de la komitato estas des pli grava, ke ĝia Prezidanto estas la Prezidanto de la ŝtata konsilantaro /funkcio egala al tiu de ŝtatprezidento/ kaj ke en la komitaton eniris ministroj kaj aliaj gravuloj. Efektivigo de tiu ĉi decido, antaŭ ĉio eldono de „Sinjoro Tadeo“ estas komisiita al ŝtata entrepreno, kiu antaŭe volas enketi la eventualan vendeblecon. Tial ĝi turnas sin al la esperantaj organizaĵoj, vendejoj, ktp. pri la antaŭa nedeviga mendo. Malgraŭ la fakto, ke „Sinjoro Tadeo“ estos bindita kaj enhavos aldonitajn ilustraĵojn, ĉiu ekzemplero kostos tre malmulte kaj la revendistoj profitos kutiman rabaton. La eldonejo projektas reeldonon de la fama verko de Boleslav Prus „Faraono“ kaj eventualan eldonon de aliaj verkoj el pola literaturo en Esperanto. Sukceso de tiu ĉi entrepreno signifus la turnpunkton por la esperanta movado ne nur en Polujo, sed ankaŭ en ĉiuj popoldemokratiaj landoj, eble ankaŭ en Sovetio.
Tial ni insiste petas pri amasa mondo de tiu ĉi verko, kiu pro sia tre modera prezo certe estos volonte aĉetata de multaj samideanoj. Pruvu, ke la esperanta movado estas vere serioza kaj apoginda!

Asocio de Esperantistoj en Pollando
Marszalkowska 81/32 WARSZAWA Polujo

---

Esperanto-rondeto de distrikta „Domo de kulturo“ en Třebíč aranĝos ĉijare Someran Esperanto-Tendaron /SET/ apud la akvobaro Vranov.
Okazor tri etapoj 14-tagaj kun jenaj kursoj:

| | |
|---|---|
| 3.-16.7. | A - por infanoj, komencantoj, B - por infanoj,progresintoj. Instruas: prof. Th. Kilián, Zd. Raška, P. Sittauer. |
| 7.-30.7. | A - por komencantoj, B - por progresintoj. Instruas: Th. Kilián, J. Mařík, L. Kyselý. |
| 31.7.-13.8. | C - konversacia, D - kurso instruista. Instruas: Th. Kilián, J. Mařík, Vl. Novobilský, Drah. Kočvara, J. Kuzník. |

Se vi volas submeti vin al instruistan ekzamenoj, nepre petu s-anon D. Kočvara, Kamenec 251/3, Ostrava VIII pri hejma tasko /ĝis 30.5./
SET-1955 estas bona okazo viziti pentrindan regionon de suda Moravio.
Belega Vranov-lago situl nur 60m de la tendarloko. Partoprenantoj vizitos por vaporŝipo kastelojn Bítov kaj Cornštýn. Al instruado estas dediĉita antaŭtagmezo; posttagemeze ekskursoj, ludoj. Vespere programoj ĉe fajro. Pri la sukceso de SET zorgos gvidantoj de la tendaro, instruistoj kaj elektita komitato. Bonkvalita manĝaĵo 5foje dum tago. Loĝado sub tendoj, event. en kabano. Tendartakso 210 Kčs por 14 tagoj. Fervojrabato 50% se vi alias ĝis 15a de junio. Ĉiu etapo komenciĝas sabate, forveturo dimanĉe. Ne prokrastu kaj tuj sendu vian aliĝon al Jan Werner, Helceletova 16, B r n o.
Nova Esp.rondeto en Drahotuše /distrikto Hranice/, kiu antaŭ ne longe estis fondita de gesamideanoj el Přerov, komencis sian laboron. 30 gesamideanoj kunvenas ĉiumarde de 18,30-21 h. Kurson gvidas s-ano Richard Jůrka. Ni gratulas.

---

Proksima numero aperos fine de junio.
Viajn kontribuaĵojn sendu frutempe al Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

**Praha-ek-1955-25_26-06**



VERDA VOĈO

„D o k s y“ j u b i l e a s.

En Ĉeĥoslovakio ne estas konscia esperantisto, kiu ne konus la nomon Doksy kaj ne scius pri la ekzisto de tiea Somera kolegio de Esperanto, kies tradicia somera kursaro de la j. 1946 ĝis hodiaŭ reprezentas someran esperantistan movadon en ĈSR.

Estas kaŭzo de fiero lerni Esperanton en Doksy, perfektigi tie sian priesperantan scion, ĉeesti en seminario lingvajn, literaturajn kaj historiajn prelegojn, instrui kaj prelegi en la Kolegio kaj partopreni ĉiujaran literaturan konkurson „Floraj Ludoj“.

Malfacile oni forgesetas la amikan samideanan medion, elsorĉitan de la kulturaj kaj amuzaj entreprenoj en la somera „Doksy“, longtempe oni rememoriĝas pri la tuttaga aŭtokara ekskurso kaj somera karnavalo, kiuj anoncas la fermon de la kursaro kaj la finon de la komuna ĝojo. „Duonjaron“, diras la partoprenintoj de la Kolegio, „oni rememoras Doksy kaj la duan duonjaron ni antaŭĝojas je ĝia malfermo“! ---

Ĉi-jare de la 17a ĝis la 30 de julio kunvenos – jam je la deka fojo- en Doksy ĉe Mácha-lago novaj interesiĝantoj pri Esperanto, la frekventintoj de la kolegia kursaro kaj la amikoj de la Somera kolegio de Esperanto por fesi la dekan jubileon de ĝia ekzisto.

---

VIVJUBILEO: La 3an de junio festas sian 50jaran naskiĝtagon samideano Antonín SLANINA, membro de la Prepara komitato de la SKED, ĝia referento por kulturaj kaj amuzaj entreprenoj, redaktoro de „Verda Voĉo“, ktp. Multe da sano kaj humoro en la pluaj jaroj elkore deziras al li SKED.

---

„FLORAJ LUDOJ“: Okaze de la ĉi-jara kursaro aranĝos SKED la VII. Belartan literaturan konkurson „Floraj Ludoj“. Detalaj informoj aperos pli poste.

---

ĈU VI JAM ALIĜIS AL SKED?
Informas kaj aliĝojn akceptas: s-ano Václav Špůr, Moskevská ul., Doksy u Máchova jezera.

---